

III

Disparidade de Linguagens e Separação dos Espíritos

Nas linhas inferiores da Terra, os seres de caráter rudimentar, pelo primitivismo das manifestações que os singularizam, correspondem-se facilmente uns com os outros.

Os bovinos de uma pastagem síria berram de modo análogo aos brutos da mesma espécie numa estância chilena, e o gemido de um cão em Londres, é idêntico, em tudo, ao choro esganiçado de um cão em Tóquio.

Do fonema, porém, à linguagem articulada, vigem milhares de séculos, marcando a peregrinação da inteligência.

Se o animal, diante do homem, está limitado ao cubículo da interjeição, o homem, perante o anjo, ainda está preso ao cárcere verbalístico.

Por essa razão, entre as criaturas encarnadas e entre as criaturas desencarnadas, apesar da reflexão mental incontestada, a linguagem é veículo ao plasma criador do pensamento, estendendo-o ou enquistando-o, conforme o raio de ação em que se demarca.

III

Malsameco de Lingvoj kaj Disiĝo de la Spiritoj

En la malsuperaj klasoj sur la Tero, la estaĵoj kun karaktero rudimenta pro la primitiveco de siaj karakterizaj esprimoj facile korespondas unuj kun la aliaj.

La bovoj el siria paŝtejo muĝas simile al la samspecaj brutoj en Ĉilio bieno, kaj la ĝemo de hundo en Londono estas tute identa al la akuta ploro de hundo en Tokio.

Sed inter la fonemo kaj la artikulaciita lingvo staras miloj da jarcentoj, atestante la marŝon de la intelekto.

Se la besto, rilate al la homo, estas limigita al la malvasta ĉambreto de la interjekcio, la homo, rilate al la anĝelo, ankoraŭ troviĝas enŝlosita en la karcero de la vorto.

Tial, malgraŭ la nekontestebla mensa reflektado, inter la estuloj enkarniĝintaj kaj inter la estuloj elkarniĝintaj, la lingvo estas vehiklo de la plasmado, kiu kreas la penson, plivastigante aŭ enkistante ĝin, konforme al la vasteco de sia radio de agado.

As conquistas de um povo estão, desse modo, encerradas com ele, em seu mundo idiomático, retardando-se, indefinidamente, a permuta providencial que faria das nações mais cultas mentoras diretas das que respiram na retaguarda.

A face disso, o Oriente e o Ocidente sempre nutriram entre si profundas antinomias e raças diversas se digladiam, desde longevas civilizações, restritas à faixa das idéias que lhes são próprias, cristalizadas na hegemonia política ou religiosa, mantendo guerras periódicas de perseguições e extermínio, em que largas possibilidades de tempo são sacrificadas ao deserto do afastamento, no qual a ignorância se converte em perigoso verdugo, embora os princípios redentores, formulados pelos pioneiros da evolução, convocando as pátrias terrestres ao aprimoramento e à fraternidade, repousem nas bibliotecas preciosas e bolorentas, à feição de mortos ilustres.

Tiamaniere, la konkeroj de iu popolo estas enfermitaj kun ĝi en ĝia lingva mondo, kio ja prokrastas senfine la providencan interŝanĝon, kiu farus la plej klerajn naciojn senperaj mentoroj de tiuj ankoraŭ ne progresintaj.

Pro tio, Oriento kaj Okcidento ĉiam nutris inter si profundajn antinomiojn, kaj rasoj malsamaj interbatalas jam de pratempaj civilizacioj, katenitaj al la niveloj de siaj propraj ideoj, kristalligitaj ĉe la politika aŭ religia hegemonio, subtenantaj periodajn militojn de persekutoj kaj ekstermo, en kiuj longaj tempospacoj estas oferitaj por dezertigo kaj disigo, en kiuj la malklereco ŝanĝiĝas en danĝeran ekzekutiston, kvankam la elaĉetaj principoj, formulitaj de la pioniroj de la evoluo, kaj alvokantaj la surterajn patrujojn al pliboniĝo kaj fratamo, ripozas en la riĉaj kaj ŝimaj bibliotekoj, simile al kleraj mortintoj.